

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 3-a parto
Claude Gacond, 267-a radioprelego, 1968.11.20 & 23

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tiun ĉi aŭtunon malfermiĝas la jubileo Mahatma Gandhi. Kiel ni jam anoncis, la svisaj esperantistoj festos tiun ĉi jubileon en La Chaux-de-Fonds ĉisemajnfine la 23-an kaj 24-an de novembro. Ni certe havos la okazon aŭdigi la voĉojn de la prelegistoj, kiuj parolos en tiu manifestacio.

A.- Dum la du lastaj elsendoj ni tradukis al vi kelkajn paĝojn el la tagĵurnalo de Romain Rolland. Ili rakontas pri la restado de Gandhi en Svislando. Estis en decembro 1931. La Mahatma revenis el la Konferenco de la Ronda Tablo okazinta en Londono. Post tranoktado en Parizo li alvenis en Territet por viziti sian amikon Romain Rolland. Geedzoj Edmond kaj Yvonne Privat lin akompanis, kaj la svisa popolo lin survoje festis.

Cl.- Ni vidis kiel okazis la unua interparolo inter Gandhi kaj Romain Rolland. Tiun kunsidon partoprenis Mira, la dommastrino de Gandhi, filino de brita admiralo, kaj la du sekretarioj Mahadev Desai kaj Pyarelal. Apud Romain Rolland troviĝis Madeleine Rolland, la fratino de la verkisto, kiu angligis frazon post frazo al la hinda gvidanto la monologon de Romain Rolland, kaj Marie, la sekretariino de Romain Rolland. Dum tiu unua kontakto nur Romain Rolland parolis, ĉar la lundo estas silenta tago por Gandhi.

A.- Ni daŭrigas la rakonton ĉerpante kaj tradukante el la tagĵurnalo de Romain Rolland.

Cl.- *« Kiam la interparolo ĵus ekfiniĝis, la pordo de mia ĉambro estis kvazaŭ perfortita de Miss Muriel Lester, kies gasto Gandhi estis en Londono.*

A.- *Ŝi estas inteligenta kaj vigla anglino, kiu zorgas pri la mizeraj popoltavoloj en Londono. Ŝi estas bruska kaj mastrema. Mi estus pardoninta al ŝi tiun kapricon perforti mian hejmon, se ŝi ne estus malferminta la vojon al aliaj vizitantoj.*

Cl.- *Al unu el ili mi nepre estus rifuzinta la eniron, se mi estus akurate koninta lian identecon : li estis giganta agente de la brita polico, li nomiĝas Evans, kaj li estis ŝargita kun samprofesiano eskorti Gandhi ĝis lia enŝipiĝo al Hindio. Gandhi ŝajnis lin rigardi kaj lin prezenti al mi kiel amikon. Ĉu naiveco aŭ senintereso ? Mi konkludas por la dua ebleco, ĉar mi scias, ke ĉe Gandhi troviĝas nenia naiveco.*

A.- *Sed estas danĝere. Tiuj policistoj sin diras dungitaj por la protektado de Gandhi. Sed fakte ili lin observadas. Ili kontrolas liajn agojn kaj gastojn. Kaj tion la dika Evans tiom malmulte kaŝas, ke li informiĝis ĉe Edmond Privat pri la temo de niaj interparoladoj. Kaj tiu afabla Privat infanece respondis, ke mi raportas al Gandhi pri Ruslando.*

Cl.- *La rezulto estos, ke post kelkaj tagoj la gazeto **Feuille d'Avis de Montreux** avertos la etan Svislandon kontraŭ la ĉarmado de Gandhi. Oni reprezentos lin alvenanta ĉe la **bolŝevisto Romain Rolland** kaj laboranta al la malarmado de la kuraĝaj svisoj, tio por povi ilin liveri al la moskva komunismo. »*

A.- Romain Rolland daŭrigas : *« La lundo estas ege pluvema ĝis la duono de la posttagmezo. Tiam Gandhi eliras la vilaon, kaj Mira penas por lin trovi, ĉar li rapidegas. Kune ili promenadas en la urbo Villeneuve, ĝis la ponteto, kie eliras vojeto kondukanta tra la kan-kampoj al la bordo de la lago. Fotistoj ilin bildpafas el diversaj lokoj. Loĝantoj en Villeneuve faras malafablajn rimarkojn. Marie aŭdas :*

Cl.- *« Li estas forpuŝe malbela. »*

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 3-a parto
Claude Gacond, 267-a radioprelego, 1968.11.20 & 23

Cl.- *Svisaj kaj britaj policistoj ilin postsekvas. La telefono ne plu ĉesas sonoradi. Dum la vespero Privat restados ĉe ni du aŭ tri horojn por respondadi al la alvokoj sen povi forlasi la aŭdilon.*

A.- *Ĝenevanoj plendas : ilian urbon laŭ ili oni forferis profite al Lausanne. Ili volas havi sian porcion el Gandhi. Oni decidis organizi mitingon je ĵaŭdo. Privat tion decidis kontraŭvole : li timidas antaŭ Gandhi, kaj li timas la alfrontadon de malamika publiko. Sed ĝuste tio interesas Gandhi : li trovas plezuron en la respondado al kontraŭdiroj. »*

Cl.- La tagĵurnalo de Romain Rolland raportas pri la dua interparolo okazinta la morgaŭon inter Romain Rolland kaj Mahatma Gandhi. Ni tradukos al vi kelkajn erojn el tiu interesa diskuto la venontan semajnon. Hodiaŭ ni nur menciu, ke tiu diskuto temis pri la reventraveturo de la faŝisma Italio kaj pri la respondo de Gandhi al la monologo de Romain Rolland okazinta dum la unua kunveno. En tiu respondo Gandhi malkovrigas parton de sia intima personeco, de sia filozofio kaj de sia satjagraha agado.

A.- Dum tiuj interparoloj forgesita en angulo de la ĉambro de Romain Rolland laboradas la japana skulptisto Takata modelante sian argilon.

Cl.- La posttagmezo de tiu mardo 8-a de decembro restis longe en la memoro de la ĵurnalistoj. Tri mitingoj sin sekvas en Lausanne. La dua estas publika kaj la radio-elsendejoj disaŭdigas la debatojn. Jen kiel Romain Rolland raportas pri tiu disaŭdigo :

A.- *« Mi povas lin klarege aŭdi en mia manĝoĉambro, ĉar mi restis hejme kun Marie. La aliaj estas en Lausanne. La voĉo de Gandhi aperas kiel mirige neta, trankvila, firma kaj bone silabigita. Sonnivele ĝi baritonas ; oni mezuras ankoraŭ pli bone, ol kiam oni troviĝas apud li, la fortikecon de la instrumentisto ; li kapablas paroladi tiel dum horoj, sen ke lia voĉo malkaŝu lacecon. Oni ankaŭ bonege aŭdas Privat, kiu tradukas el la angla francen, kaj la reagojn de la publiko, kiu varmege aplaŭdas ; post iuj pikaj rebatoj de Gandhi oni ridas. »*

Cl.- Romain Rolland daŭrigas : *« Malĝoje la plej interesa el la tri mitingoj estis la unua, kiun mi ne povis aŭdi. Pri ĝi raportis mia fratino Madeleine meznokte post la reveno. Tiu kunveno estis privata. Ĝin ĉeestis Gandhi kaj lia amiko Pierre Ceresole kaj la amikaro kaj estraro de la movado Internacia Civila Help-servo. »*

A.- La venontan semajnon, kiel ni jam diris, ni tradukos al vi parton de la dua interparolo okazinta inter la hinda gvidanto kaj la franca verkisto. Tiu interesa priskribo de la restado de Gandhi en Svislando estas traduko de citaĵoj el la tagĵurnalo de Romain Rolland.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-